

Infinitivo aŭ supino?

Prenante el la Latina verbojn, Interlingvo povas sekvi tri malsamajn principojn: 1) preni por ~~la~~ ^{sama} verbo unupartan supinan temon de la Latina por formi la pasivan participon kaj aliparte la infinitivan por la aliaj verbaj formoj. Tion faras ekz. Latino sine Flexione: vide - viso, accipe - accepto, propone - proposito ktp.

2) preni unu solan temon por unu verbo, preferante la infinitivan temon al la supina kaj derivi la pasivan participon per sufikso. Tion faras kutime Esperanto: dividi, ofendi, instrui ktp.; la supinaj temoj (direkti, redakti) estas rilate maloftaj.

3) preni same unu solan temon kaj preferi la supinan al la infinitiva. Tion faras principe Ido kiu reformas ekz. Esp. proponi, legi, kondukki, esprimi, defendi, koncedi, eksplozi, konstrui ktp. por proponar, lektar, konduktar, expresar, defensar, koncesar, explorar, konstruktar ktp. ~~Mi~~ Notu ke tiu reformo estis farata tute nekonservence kaj neregule; ofte oni lasas la infinitivan temon de Esperanto sen ia fundamento. Ekz. dividar, rompar (sed koruptar), konvinkar, diskutar, seducar (sed duktar), tondar, tordar, konkludar, pretendar (sed extensar) kaj tre multaj aliaj. Oni rimarkas ke tia nekonservenco estas granda malfacileco por la studentoj.

Kiu el la tri cititaj principoj estas preferinda?
Mi opinias, ke la unua estas neakceptebla en Interlingvo.

proke derigante memori por la tuta verbaro ^{po} en malsamaj formoj, kaj oni ne povas enkonduki en Interlingvon tiun neregulecon de la latinaj verboj, kiam oni kunopinas ke tiu ^{lingvo} devas celi al "minimumo de gramatiko" kaj esti destinita ankaŭ al personoj nekonsistantaj la Latinan. Estas vera, ke se oni derivas la pasivan partikipon per unu sama sufikso, oni ricevas kelkajn ion barbarajn formojn (finata, vidata), sed 1) tio estas tute nekonstanta kompare kun la malfacileco rezultanta el la duoblaj formoj, 2) la romanaj lingvoj ~~hasas~~ prezentas multajn ekzemplojn de paso de unu konjugo al alia, tiel ke kio estas "barbara" al unu lingvo, estas tute natura por alia, ekz. L. tremere - I. tremere, I. recivere - S. recibir, I. existito - F. existe, L. sensio - I. sentito (Ktp. 3) la neologismaj verboj en niaj lingvoj apartenas kuintime al unu sola konjugo (F. baser, telephoner, G. revidiren, telegraphiren) kaj tendenco al unueco de konjugo estas konforma al evolucio de lingvoj.

Nun, inter la dua kaj tria solvo, mi elektus tiun alprenitan de Esperanto. Efektive, 1) La prefero de supino estas aplikibla sole al parto da verboj, nome al tiuj de la tria konjugo, proke certe estas neoportuna uzi ^{aktivajn infinitivon} formojn (kiel amati (part. pas. amatata), dormiti). 2) Diskuteblas, ke supino estas pli konata en derivatoj de modernaj lingvoj ke infinitivo, ekz. E. intellectual, ~~sed~~ E. offence sed to offend, F. expression, sed exprimer, S. protection sed proteger, S. rector sed regera Ktp.

3) Infinitiva temo estas pli facilpronuncebla (ekz. por italoj), pli repese kaj belsone. Komparu instrui al instruktar, legi al lektar, etendi al extensar, proponi al proponzar.

Unu prenas la supinan temon sole se substantivo aŭ adjektivo ne estas logike konsiderebla per sia sencoj kiel pasiva participo, ekz. aspeto, resta, prezo; kiam la infinitiva temo havas jam alian sencojn (vidi, vizi; kuro, kurso) aŭ eble ankoraŭ kiam la supina radikoj estas vere pli internacia: redakti (?), akcepti (?).

En aliaj okazoj, oni devas preferi la infinitivan temon kiel faras kutime Esperanto kaj la pasivan participon derivi per sufikso.

Georges Kolowrat